

# La Espero

2005:6

## Komuna kongreso de svedaj kaj danaj esperantistoj okazos en 2006



Fotis: Mårten Svemark © Malmö Turism

### **Komuna kongreso de SEF kaj DEA en Malmö en 2006.**

En 2006 Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö 100-jariĝos. Por festi tion ni decidis inviti la svedajn kaj danajn esperantistojn por komuna kongreso. Tiu kongreso okazos 25-28 de Majo 2006 en Malmö. En la venonta numero de La Espero ni faros tradician inviton. Se vi jam nun volas

informiĝi pri la kongrespreparoj nia retadreso estas [www.agado.net](http://www.agado.net)

Tie ni iom post iom aktualigos informojn pri aliĝo, provizora programo, proponojn pri tranokto ktp.

Bonvenon al Malmö en 2006!

**Sten Svenonius**  
prezidanto de la kongresa komitato

## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Novembro 2005 • 93-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktör och ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [esperanto@glocalnet.net](mailto:esperanto@glocalnet.net)

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2006: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
Nätsida: [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2006:

Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm.  
Expedition: Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg. Beställningar skickas till expeditionen.

Telefon: 031-12 05 94 (telefonsvarare).  
Telefontid: tisdagar 18-19.

Postgiro: 578-5

Nätsida: [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)  
E-post: [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com)

Styrelsens ordförande: Anita Dagarmarsdotter

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgård 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: [esperanto@glocalnet.net](mailto:esperanto@glocalnet.net)

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. Insända manuskript återsänds ej.

## NI PREZENTAS

# Sonja Petrović



*Kie vi naskiĝis?*

En Beogrado, tiutempe Jugoslavio, nun Serbio kaj Montenegro.

*Kie vi loĝas?*

Antaŭurbo de Stokholmo.

*Pri kio vi laboras?*

[www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj aliaj Esperanto-projektoj.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Mi ŝatas promeni/ekskursi en naturo, legi, beligi hejmon, kaj nun ankaŭ provas plibonigi mian svedan kaj lerni pli pri mamnutrado por helpi al patrinoj kiuj havas problemojn.

*Ĉu vi havas familion?*

Jes, filineton Iva (<http://ivulino.blogspot.com>) kaj edzon Hokan. (Vidu ĉi-supre. *ndlr*)

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

Ekde kiam mi aŭdis pri ĝi de mia patro (kio okazis pli frue ol mi memoras), sed mi eklernis ĝin nur en la jaro '98.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Mi estis A-komitato de TEJO por SerbeJO 1999-2001, TEJO-estrarano 2001-2005, E@l-estrarano 2003-2004 kaj ekde junio 2005 estas en la estraro de SEJU, kie mi respondecas pri rilatoj kun LSU. Mi ankaŭ estas kunordiganto de la projekto "lernu!" ekde ĝia komenco.

*Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?*

Mi ne scias.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

Estimataj samideanoj!

En tiu ĉi numero de *La Espero* vi vidas ke multe el la informoj publikigitaj estas prenitaj el diversaj retpaĝoj en interreto. Tio estas tendenco, kiu kreskis dum la jaroj kiam mi estis redaktoro de la revuo.

Kompreneble oni povas multe pli rapide trovi informojn en interreto.

Tamen montriĝis ke ne ĉiuj homoj serĉas informojn en interreto. Tial revuoj estas daŭre bezonataj. Kia estos la situacio post dek jaroj, ne ne scias.

Mi rimarkis ke ankaŭ multaj esperantistoj en la evolulandoj, eĉ tiuj kiuj loĝas en rifuĝejoj en Afriko, uzas interreton. Mi povas imagi ke por ili la interreto estas multe pli facila metodo komuniki, ol multekostaj leteroj kaj aliaj sendaĵoj.

Same Esperanto estas pli facila metodo komuniki ol longdaŭra lernado de naciaj lingvo. Do, Esperanto + interreto = bona kombinaĵo.

Via redaktoro

# Parolantaj libroj estas plu bezonataj

## MEDLEMSAVGIFT 2006

Din medlemsavgift till Esperantoförbundet för 2006 betalar du till din lokala klubbkassör. Om du är direktmedlem i förbundet betalar du enligt anvisningarna på sidan 2 i denna tidning.

Ekde la 1930-aj jaroj oni produktas sonlibrojn, kaj en la 1950-aj jaroj oni komencis surbendigi ankaŭ esperantlingvajn librojn. Unika, granda kolekto de esperantlingvaj sonlibroj estis lastatempe detruita en Nederlando, kaj multaj ekzistantaj surbendigoj daŭre atendas prilaboron. Otto Prytz opinias, ke spite la teknikan evoluon, parolantaj libroj daŭre estas bezonataj.

Sonlibrojn oni komencis produkti en Usono en la 1930-aj, komence sur gramofonaj diskoj, kiuj turniĝis malrapide, je la rapideco de 16 turno minute. La celgrupo de tiuj libroj estis blinduloj. En la 1950-aj jaroj oni transiris al registrado sur magnetofonaj bendoj, kaj tiam la sonlibroj disvastiĝis al multaj eŭropaj landoj. Daŭre la celgrupo estis blinduloj. Tamen en la lastaj jaroj oni komencis komerce produkti sonlibrojn ankaŭ por aliaj celgrupoj.

La konata blinda esperantisto Otto Prytz, universitata instruisto pri la hispana lingvo en Oslo, opinias ke sonlibroj daŭre estas bezonataj, spite la teknikan evoluon.

- Ili taŭgas por rapide legi, por legi sinsekve (sen foliumi tien kaj reen), por alproprigi enhavon... Sed ili absolute ne taŭgas por vortaroj. Mi iam bezonis kvaronhoron por bobenumi ĝis la ĝusta paĝo en sonlibro, en kiu la registranto indikis la paĝonumerojn (sed ne havis la teknikan eblon meti signalojn, kiuj aŭdiĝus ĉe bobenumado).

Ĉu tamen la graveco de la sonlibroj ne malpliĝas pro la evoluo de la komputila teknologio? Ja nun eblas

facile igi komputilon voĉlegi aŭ brajligi elektronikan tekston.

- Ne eblas respondi ĝenerale. Ne ĉiuj voĉsinteziloj estas sufiĉe bonaj por anstataŭigi homan voĉon; ne ĉiuj elektronikaj formatoj estas same alireblaj, ekzemple pdf estas aĉa, diras Otto Prytz.

Maria Sandelin, bibliotekisto kiu profesie okupiĝas pri sonlibroj, opinias ke la homa voĉo daŭre estas bezonata.

- Per voĉsintezilo oni apenaŭ povas ĝui beletran verkon. Tre gravas la homa voĉo, multaj el miaj klientoj eĉ speciale petas librojn, kiujn voĉigis ilia ŝatata legisto. Kaj brajlon la plej multaj maljunaj vid-handikapitoj tute ne kapablas legi, diras Maria Sandelin.

## Brajlo, ne brajlaj libroj

Kaj kion pri la brajlaj libroj, Otto Prytz, ĉu ili plu estas same bezonataj kiel antaŭe?

- Ne necese brajlaj libroj, sed jes brajlo. Se mi volas citi el faka artikolo, sonlibro malfacile taŭgas, ĉar la registrantoj ĝenerale ne donas la interpunkcion, nek literumas ĉiujn proprajn nomojn, nek atentigas pri kursivoj, nek avertas, kie estas la alineoj, kaj tiel plu. Por tiaj bezonoj necesas skriba teksto, ĉu en la formo de surpapera brajlo, ĉu en la formo de "sur-ekrana" brajlo. Kaj brajlan libron oni povas kunporti pli facile ol komputilon: eĉ enlite oni povas komforte legi brajlon. Sed legado de brajlo ne estas tiom rapida, kiom legado de sonlibro.

## Esperantlingvaj sonlibroj

Fine de la 1950-aj jaroj oni komencis iom pli vaste produkti ankaŭ esperantlingvajn sonlibrojn. Multajn sonlibrojn oni produktis en Ĉeĥoslovakio, kaj en la Blindul-muzeo en Brno eĉ konserviĝis la hungara magnetofono de la marko MOM, kiu estis uzata por surbendigi tiujn esperantajn sonlibrojn.

Esperantajn sonlibrojn produktis ankaŭ la Pola Radio, kiu interalie eldonis la tutan klasikan romanon La faraono de Boleslaw Prus, en la traduko de Kazimierz Bein, voĉlegite de Andrzej Pettyn. Tiu libro plenigis 38 sonkasedojn.

Unu el la grandaj produktintoj de

esperantlingvaj sonlibroj estis la biblioteko en Nijmegen, Nederlando. En 1986 aperis 20-paĝa katalogo de tiuj sonlibroj, sed la libroj mem ne plu estas haveblaj, ĉar la tuta kolekto estis detruita lige kun la transiro de la nederlandaj bibliotekoj al la pli moderna teknologio. Tiu detruo cetere ne trafis nur la esperantlingvajn sonlibrojn, sed ankaŭ la plimulton de la nederlandlingvaj.

- Ĉiujn originalajn sonbendojn (la patrinajn bendojn) oni detruis. Nur kelkajn titolojn (en la nederlanda, kiuj ankoraŭ estas popularaj) oni reregistris digitale, rakontas Jan Bemelmans, kiu mem okupiĝis pri brajligado de libroj en la sama biblioteko.

Otto Prytz kredas, ke la plej multaj el tiuj libroj estas poreterne perditaj.

- La praktiko estis havi unu "mas-tran" ekzempleron registritan sur "profesia" bobena bendo (do je alta rapideco), kaj el tiu originalo oni faris surkasedajn kopiojn laŭ la bezono de la biblioteko (eble 5-6 ekzempleroj). Leginte la libron, la prunteprenanto devis resendi ĝin al la biblioteko. Kompreneble, se iu ne obeis la laste menciitan instrukcion, aŭ se iu hejme faris privatan kopion, povas ekzisti kopioj...

Tamen ekzistas aliaj kolektoj de sonlibroj, kiuj atendas transigon al moderna digitala formo por pli facila distribuado. Unu el la kolektoj troviĝas ĉe la esperantista sekcio de la Pola asocio de nevidantoj, PANES. Tiu asocio en 1977 kunlaboris pri la aperigo de La faraono, kaj en 1986 eldonis la famegan romanon Quo vadis de Henryk Sienkiewicz en 31 kasedoj.

Per moderna teknologio la tuta Faraono havus lokon sur unu disko, kaj ankoraŭ preskaŭ restus loko por Quo vadis. Tial en ĉiam pli multaj landoj la bibliotekoj kiuj okupiĝas pri sonlibroj estas transirantaj al la nova teknologio kun la nomo Daisy. Tiu sistemo uzas la sonformaton mp3, sed ĝi ankaŭ aldonas apartajn kodojn por ebligi specialan sistemon kiu faciligas trovadon de la serĉata loko en la libro. Krome tiu teknologio ebligas meti sur la sama disko en facile uzebla formo kaj la voĉlegitan version kaj la tekstan version de la sama libro. Tamen ĝis nun neniu esperanta libro aperis laŭ la nova sistemo.

Kalle Kniivilä  
www.liberfolio.org



# Riksdagsmotion om esperanto i skolan



Gustav Fridolin,  
Stockholms stad  
Fotograf: Kristoffer  
Talltorp

*Den miljöpartistiske riksdagsledamoten Gustav Fridolin har lämnat in en motion om esperanto i skolan. Här är den preliminära texten.*

## Förslag till riksdagsbeslut

1. Riksdagen tillkännager för regeringen som sin mening vad i motionen anförts om att esperanto på sikt skall kunna väljas som språkval i alla skolor på högstadiet och gymnasiet.
2. Riksdagen tillkännager för regeringen som sin mening vad i motionen anförts om att det bör organiseras kurser i esperantoundervisning för språklärare i grundskola och gymnasium.
3. Riksdagen tillkännager för regeringen som sin mening vad i motionen anförts om att det bör organiseras en nätkurs i esperanto för högstadiet och gymnasieskolan.
4. Riksdagen tillkännager för regeringen som sin mening vad i motionen anförts om att det bör tas fram en esperantoversion av den europeiska språkportföljen Hyperlink.

## Om esperanto i skolan

### Allmänt

Esperanto skapades för mer än hundra år sedan. Genom krig och fred har det sedan dess varit ett brospråk mellan människor och kulturer – ett språk att mötas på som jämlikar. Under detta dryga sekel har esperanto hunnit bevisa att det verkligen fungerar. Esperanto är lättare att lära sig än etniska språk, och samtidigt har språket uttrycksmöjligheter som andra språk saknar. Det är mycket lätt att bilda nya ord på esperanto, och dessa ord kan förstås av var och en som bekantat sig med språket, även om man aldrig mött ordet förut. Esperanto används idag till i stort sett allt som skapas på andra språk: skönlitteratur (såväl prosa som poesi och dramatik), facklitteratur, tidskrifter, musiktexter, filmer, radioprogram, på Internet, och så vidare. Internet har inneburit ett uppsving för Esperanto, vilket visar att språket är väl lämpat för vår globala tidsålder med dess snabba tekniska utveckling och världsomspännande kommunikationsvägar. Runt om i världen kan man

tydligt märka ett ökat intresse för esperanto, många esperantotalare finns i Brasilien, Kina, Ryssland och Västafrika, och inte minst bland företrädare för världens ursprungsbefolkningar och bland talare av små, ofta utrotningshotade språk.

### Särskilda aspekter

Esperanto är konstruerat för att vara lätt att lära sig. Man kan alltid veta hur ett ord uttalas när man ser det skrivet, och tvärtom. Språkssystemet, d.v.s. grammatiken, präglas av en harmonisk avvägning mellan kraven på enkelhet å den ena sidan och exakthet å den andra. Allt detta gör att man kan tillägna sig esperanto på avsevärt kortare tid och med betydligt mindre ansträngning än de etniska språken. Efter ett års esperantostudier kan svenska sistaårsgymnasister uttrycka lika mycket på esperanto som de kan på engelska.

Eftersom man så snabbt förvärvat praktiskt användbara språkkunskaper när man läser esperanto, upplever den studerande också en känsla av tillfredsställelse och studieglädje: språk blir "roligt". Till detta kommer att esperanto som konstruerat språk är fullkomligt regelbundet; därigenom utvecklar den som studerar esperanto en blick för hur språk generellt är byggda. Det stimulerar inlärningen av språk i allmänhet, vilket är oerhört värdefullt sett mot bakgrunden av att många elever i skolan upplever språk som något svårt och "jobbigt". Esperanto utgör på så vis ett utmärkt stöd för hela språkspektorn inom skolan.

Esperanto vill alltså stödja, inte döda andra språk. I världen idag dör språk med en förfärande hastighet, därför att de stora kolonialspråken, trots kolonialväldens avveckling, breder ut sig på de mindre språkens bekostnad. Många föraktar sitt eget modersmål och föredrar att använda något av högstatusspråken istället. Man är i allmänhet väl medveten om vikten av biologisk mångfald, men att den kulturella mångfalden i världen är lika hotad idag nämns ytterst sällan i den allmänna debatten. Esperanto skapades redan från första början för att vara ett neutralt kommunikationsmedium mellan de etniska språken. Som internationellt

brospråk skulle esperanto kunna bli ett effektivt medel i kampen för de olika kulturernas överlevnad i en globaliserad värld.

Inom Europeiska Unionen talas allt intensivare om hur den officiella jämställdheten mellan de olika språken skall kunna fås att fungera i praktiken. Principen inom EU-institutionerna är ju, att man skall tolka resp. översätta från alla språk till alla språk. Ju större EU blir, desto svårare blir det givetvis att upprätthålla denna princip. I det vardagliga arbetet tycks engelskan och franska vara på väg att ta över. Tjänstemän och parlamentariker inom EU som inser att denna utveckling innebär ett hot mot det ideal som Unionens principer i detta avseende representerar, det vill säga att man måste slå vakt om den kulturella rikedom som alla Europas språk tillsammans är bärare av, dessa personer pekar nu på möjligheten att använda esperanto som ett s.k. pivotspråk. Enligt denna modell skulle anföranden och dokument översättas till och från esperanto istället för från varje enskilt språk till varje enskilt språk.

Även inom FN diskuteras från och till problemet med kostnader för översättningar och det uppenbart ojämlika förutsättningarna människor från olika länder har att verka inom FN-systemet. Förutom den praktiska och kulturellt viktiga principiella vinst som det skulle innebära att använda esperanto i EU och/eller FN, skulle den också medföra stora kostnadsbesparingar.

Av det ovan sagda framgår klart att det vore en stor fördel om esperanto fick bli en naturlig del av skolans utbud. Esperanto är redan idag ett skolämne i Sverige, nämligen som individuellt val på vissa gymnasier; där så är fallet, har kurserna tillkommit på initiativ av enskilda lärare. I andra länder är esperanto betydligt vanligare på skolschemat; i synnerhet gäller detta Litauen och Ungern, där esperanto är tredje största främmande språk på gymnasiet. Esperanto är dessutom universitetsämne i inte så få länder, däribland Sverige (Umeå Universitet).

Om esperanto skulle bli ett populärt språkval i skolan (och erfarenheter från andra länder pekar på att det skulle kunna bli så), kommer det naturligtvis att dröja en tid innan alla skolor kan ordna esperantolärare, ungefär på samma sätt som vissa skolor idag inte kan ordna lärare i spanska. Vad som är speciellt med esperanto är de större möjligheterna för elever att själva lära sig språket på distans eller via internet, p.g.a. den regelbundna strukturen och uttalsreglerna.

Stockholm den 2 oktober 2005  
Gustav Fridolin (mp)

## Granda verkisto forpasis



Bakin juna.

### FÖRLAGETS HEMSIDA

Unna dig en bok  
till julen. Besök Es-  
perantoförlagets  
hemsida  
[www.esperanto.se/](http://www.esperanto.se/)  
eldona

Unu el la plej gravaj kaj popularaj Ĉinaj verkistoj de la 20-a jarcento, la veterana esperantisto Bakin (Ba Jin; origine Li Feigan) forpasis la 17-an de oktobro. La 25-an de novembro li estus 101-jara. Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920-aj jaroj, kiam li ankaŭ tradukis el Esperanto al la Ĉina verkojn de E. Amicis, A. Tolstoj kaj Akita Ujaki. En 1932 li ĉinigis la romanon "Printempo en aŭtuno" de Julio Baghy. Ĝi forte tuŝis lin kaj inspiris lin verki ĉinlingve sian propran romanon "Aŭtuno en la printempo", kies Esperanta traduko aperis en 1980. En Esperanto aperis ankaŭ liaj romanoj "La familio" kaj "Frosta nokto".

Bakin faris gravajn servojn al la Ĉina Esperanto-movado, i.a. kiel prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kies honora prezidanto li estis. Dum la "kultura revolucio" en la 1960-aj jaroj li estis kruele persekutata kaj publike humiligata kiel "kontraŭrevoluculo", sed post la restarigo de normalaj kondiĉoj li okupis gravajn sociajn funkciojn, i.a. kiel vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco. En 1981 li fariĝis prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio. En 1981 Bakin estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis membro de la Honoraj Komitatoj de ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Pekino, en 1986 kaj 2004.

## UEA kaj ILEI reprezentigis en Unesko

La akcepto de tri gravaj norm-donaj dokumentoj kaj la reelektado de Koichiro Matsuura kiel ĝenerala direktoro markis la 33-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko, kiu kunvenis en Parizo de la 3-a ĝis la 21-a de oktobro. Por la Esperanto-movado la plej interesa el la akceptitaj dokumentoj estas la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj, en kiu Unesko denove rememorigas pri la lingva diverseco kiel fundamenta elemento de kultura diverseco. La du aliaj novaj dokumentoj estas la Internacia Konvencio

kontraŭ Drogoj en Sporto, kaj la Universala Deklaro pri Bioetiko kaj Homaj Rajtoj. En la programo de la Konferenco estis ankaŭ festo por omaĝi la 60-jariĝon de Unesko.

UEA kaj ILEI, kiuj estas en operaciaj rilatoj kun Unesko, estis invititaj al la Konferenco kiel observantoj. Re-prezentiĝis entute 57 el ĉ. 350 neregistaraj organizaĵoj kun operacia statuso ĉe Unesko. Kiel delegitoj de UEA ĉeestis Renee Triolle kaj Barbara Despiney, dum Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj Francois Lo Jacomo reprezentis ILEI. Krom partopreni en pluraj kunsidoj de la Konferenco, ili havis kontaktojn kun delegitoj de ŝatoj kaj de aliaj internaciaj NRO-j.

La esperantistaj delegitoj partoprenis ankaŭ en la ekspozicio pri la Unesko-programo "Edukado por ĉiuj". Same kiel kelkdeko da landaj kaj NRO-aj delegitoj, R. Triolle nome de UEA kaj F. Lo Jacomo nome de ILEI prezentis en du-minutaj filmetoj, kiel la du Esperanto-organizaĵoj kontribuas al tiu ĉefa programo de Unesko. La filmoj estis senĉese montrataj en la halo de la Unesko-domo, kie okazis la ekspozicio.

La Konferenco elektis ankaŭ duonon de la 58-membra Plenumkomitato de Unesko por kvarjara mandato. Alia duono konsistas el 29 membroj elektitaj en la 32-a Ĝenerala Konferenco en 2003. La Plenumkomitato kunsidas dufoje jare por kontroli la plenumon de la agadprogramoj akceptitaj de la Ĝenerala Konferenco.

## 100-jara movado en televido

La 3-a tutlanda kanalo de la Nederlanda Televido elsendis mardon, la 25-an de oktobro, duonhoran filmon okaze de la 100-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en Nederlando. La elsendo enviciĝis en la ĉiusemajna rubriko de historiaj temoj "Andere tijden" ("Aliaj tempoj") de la televida asocio VPRO. Pri la historio de la lingvo kaj movado rakontis i.a. d-ro Marc van Oostendorp, s-ino J. ten Hagen, ges-roj Ans kaj Hans Bakker, kaj mag. Rob Moerbeek. Pluraj scenoj estis filmitaj en la Centra Oficejo de UEA. La tuton kompletigis malnovaj filmkaj sondokumentoj, en kiuj aperis i.a. d-ro L.L. Zamenhof, Andreo Cseh kaj la iama Ĉefministro de Nederlando Willem Drees.

La tuta elsendo, kiu laŭ la televida

esplorejo altiris 302 000 spektantojn, estas rigardebla en la retejo de VPRO. En la retejo troviĝas ankaŭ diversaj tekstoj pri unuopaj subtemoj de la elsendo kaj ligiloj al multaj Esperanto-retejoj.

## Francois Grin prelegos en UK

La temo de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco 2006 estas "Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo". Pri la temo decidis la Estraro de UEA, kiu invitis kiel reĝisoron de ĝia traktado en la UK la Ĉilian komitatano de UEA Jose Antonio Vergara. La traktadon de la temo partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo Francois Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Genevo, kiu festparolos en la kongresa inaŭguro. La temreĝisoro s-ro Vergara, [jovergaola@surnet.cl](mailto:jovergaola@surnet.cl), volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado.

Ĉiuj estas petataj kunlabori kaj kundiskuti pri la temo jam antaŭ la UK.

## Infana Kongreseto

En kiu lando naskiĝis Pinokjo, la infano el ligno sed kun koro de infano, kiu ĝojigas ĉiuaĝajn infanojn tra la mondo? En Italujo, komprenble. Kaj kie en Italujo? Apud la loko de la ĉi-jara Internacia Infana Kongreseto, kiu okazas en Prato, 20 kilometrojn de Florenco, kie okazos la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Florenco de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006-a. Pliaj informoj pri la UK ĉe: [www.ukflorenco2006.it](http://www.ukflorenco2006.it)

## 37-a Korea Kongreso de Esperanto okazis


8-an kaj 9-an de Oktobro, la 37-a Korea Kongreso de Esperanto okazis en Hankuk Universitato por Fremdaj Studoj. La temo de la kongreso estas rolo de Esperanto por protekti nacian lingvon. 130 partoprenantoj ĉeestis en la kongreso, inkluzive ĉinoj, japanoj kaj alilandaj esperantistoj.

## Du el la revuoj de UEA kaj TEJO


Revuo Esperanto, kiun ricevas la individuaj membroj de UEA (legu ĉi-sube) estas la ĉefa revuo pri Esperanto. Mi kuraĝas skribi ĉefa, ĉar laŭ mi ĝi estas la plej grava revuo de la Esperantomovado.

Ĝi raportas pri diversaj flankoj de la Esperanto-movado, pri ĝia literaturo, pri kulturo, pri renkontiĝoj. Revuo Esperanto publikigas ankaŭ noticojn pri lokaj kaj fakaj aranĝoj k.t.p.

Se vi interesiĝas pri Esperanto, revuo Esperanto estas ege interesa.



Alia revuo, kiun eldonas UEA kaj TEJO, estas Kontakto.



Ĝi temas ne ĉefe pri la Esperantomovado, sed pli multe pri la mondo. Parto de ĝi estas skribita en facila lingvo, tiel ke ankaŭ komencantoj povu legi ĝin. Tio ne signifas ke la enhavo estas seninteresa. Tute male!

## La delegita reto de UEA estas unika en la mondo

Uzi la delegitan reton de UEA estas unu el la multaj eblecoj ĝui Esperanton praktike. En la jarlibro vi povas trovi nomojn de delegitoj en sepdeko da landoj, delegitoj, kiuj estas pretaj helpi vin, skribe, rete, aŭ se vi vizitas ilian landon, ankaŭ persone. En Svedio estas multaj delegitoj, sed dum la lastaj jaroj kelkaj demisiis pro maljuneco. Ni bezonas novajn por bone plenumi nian taskon kiel membrlando de UEA. La delegitoj reprezentas la asocion en la unuopaj urboj kaj urbetoj de la lando, la fakdelegitaj servas kiel fonto de informoj pri difinita fako, kaj la junularaj delegitoj aparte okupiĝas pri agado inter gejunuloj. Por fari delegito vi devas esti individua membro de UEA (jam dum du jaroj) kaj aktiva en la esperantomovado.

Se vi volas pligrandigi la delegitan reton en Svedio, bonvolu turni vin al mi por ricevi pli da informoj.

**Lisbet Andreasson**  
(Adreso ĉi-sube)

## Prenumerera!

Svenska Esperantoförbundet erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2006. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, Tel 0415-50152

Tidning	nr/år	pris kr
Brazila Esperantisto	4	120 *
Esperanta Finnlando	6	170
Esperanto	11	330
Esperanto Dokumentoj	10	260
Esperanto en Danio	5-6	125 *
Femina	4	190
Fonto	12	285
Heroldo	17	305
ICEM	4	170 *
Juna Amiko	3	130
(Rabatt från 3 exemplar)		105
Komencanto	6	140 *
Kontakto	6	200
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	210
La Ondo	11	255
Literatura Foiro	6	285
Litova Stelo	6	130 *
Monato	11	430
Monato (retversio)		258
Norvega Esperantisto	6	115
Oomoto	2	100
ROK Gazet	1	155*
(155 kr gäller för tre nummer)		
Scienca Revuo	4	190
TEJO-tutmonde	4	105

Tidningar markerade med \* har inte lämnat prisuppgift för 2006

## Världsesperantokongressen (Universala kongreso) i Florens 29 juli-5 augusti 2006

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

	-31/12 -05	-31/3 -06 efter 1/4	-06
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1515	1890	2270
2. Icke direkt medlem i UEA	1890	2365	2835
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 76-01-01 och 85-12-31), som är medlem i UEA	755	945	1135
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1135	1420	1700

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 86-12-31 betalar ingen kongressavgift.

Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, tel. 0415-50152

Avgifterna kan komma att justeras uppåt, om kronan försvagas.

## Peto pri kontribuo

Esperanto-Gården estas ekonomia kooperativo fondita en 1997 por hejmi al movadaj kunvenoj. Ĝi samtempe estas junulara gastejo ĉe Sveda turisma asocio (STF), sen kio ĝi rapide bankrotus. Ĝi ne funkcius sen multa senpaga laboro de aro da samideanoj.

La faritaj investoj en EG estas gravaj kaj valoraj, ĉefe tiu de varmigo per rokvarmo el subgrundo. Nun ni venis al punkto kiam necesas nova investo por daŭrigi la bonstaton de la gastejo. Sukcesa gastigado dependas je haveblo de littukoj kaj ebleco lavi ŝtofojn kaj vestaĵojn. EG nepre bezonas nov-

an maŝinaron por lavi, sekigi kaj kalandri. Alie la fortoj de niaj volontuloj elĉerpiĝos vane.

Tial ni petas vin zorge pripensi, kiomgrade vi povas kontribui. Ĉu persone, ĉu per ia fonduso kie vi anas. Ĉu per donacoj, ĉu per aĉeti membropartojn (po 100 svedaj kronoj aŭ 11 eŭroj) en la kooperativo EG. (La ekonomia stato de EG ne permesas nin signi novajn pruntojn).

La investo estas urĝa. La nova lavmaŝinaro estu prete instalita antaŭ Sveda Ralio februare en 2006. Tranoktaj gastoj dum tiu ralio estas nia plej grava enspezo ĉiujara.

Via kontribuo estas tre bonvena al sveda poŝta ĝiro 98 90 65-8 "Esperanto-Gården i Lesjöfors ek. för." aŭ al UEA-konto lesj-q. Ni petas vin krome pludoni, se eblas, ĉi tiun peton al konatoj kiuj povus ankaŭ kontribui. Humile via,

# :-) **Martin Strid**  
prezidanto

tel. +46-243-124 80, +46-70-315 261 5

## Bön om bidrag

Esperanto-Gården ek. för. bildades 1997 som ett hem för vår rörelse. Den är samtidigt ett STF vandrarhem, vilket är nödvändigt för att det ska gå ihop. Den skulle aldrig fungera utan ett stort ideellt arbete av ett antal personer.

Viktiga och värdefulla investeringar har redan gjorts i EG, främst installation av bergvärme. Vi har nu nått en punkt där en ny investering behövs för att EG ska fortsätta att hårbärga gäster. Vandrarhemmet måste ha tillgång till rena lakan och möjlighet att tvätta och mangla linnen och kläder. EG behöver få nya maskiner för tvätt, tork och mangling. I annat fall kommer våra frivilligas krafter att ta slut.

Därför ber vi dig tänka över, hur mycket du kan bidra med. Personligen eller genom att du kan påverka någon fond. Med regelrätta bidrag eller genom att köpa andelar (à 100 kr) i den ekonomiska föreningen. (EG:s ekonomi tillåter oss inte att teckna nya lån).

Investeringen brådskar. De nya tvätt- och torkmaskinerna bör vara installerade före Svenska Rallyt i februari 2006. Övernattningarna under rallyt är EG:s viktigaste årliga inkomstkälla.

Ditt bidrag är välkommet till postgiro 98 90 65-8 "Esperanto-Gården i Lesjöfors ek. för." Vi ber dig även föra denna bön om bidrag vidare till dem du känner som också skulle kunna bidra.

Ödmjuka hälsningar,

# :-) **Martin Strid**  
ordförande

tel. 0243-124 80, 070-315 261 5

## Bliv medlem i UEA 2006

UEA är den största organisationen i världen för esperantister.

Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- \* sprida esperanto
- \* verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- \* underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt
- \* därmed öka förståelsen mellan folk och länder

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto, har en omfattande bokförsäljning och anordnar varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Frågor besvaras av: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby tel. 041 5-50152.

Avgifterna för år 2006 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto.	520 kr
MJ Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan!	210 kr
MG Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
SZ Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	1 040 kr
PT "Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto	630 kr
DM Dumviva membro" betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto	13 000 kr
DMJ "Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken	5 250 kr
Dpat "Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständigt medlem i "Societo Zamenhof".	130 000 kr
DPT "Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	15 750 kr

## 44 infanoj kaj 35 plenkreskuloj kune

### JULKLAPPSTIPS

Känner du någon som har visat intresse för esperanto? I så fall kan Esperantoförbundets "startpaket" vara en bra julklapp. Gå in på förbundets hemsida [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se) eller ring (se s. 2) så får du veta mer.

La infanoj povis renkonti siajn korespondantojn kaj trovi novajn geamikojn, kaj kompreneble ankaŭ la gepatroj formis novajn amikecojn, firmigis malnovajn, kaj multe lernis pri la ĉiutaga vivo de familioj en aliaj landoj, rakontas Jouko Lindstedt en sia raporto pri la ĉi-jara Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, okazinta en julio en Pollando.

La 27-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj okazis ekde la 13-a ĝis la 23-a de julio en la feriejo "Stanica Vodna" proksime al la vilaĝo Cierzpiety [Ĉespijenti] en Mazurio, bela lagoplena regiono en nord-orienta Pollando. Partoprenis 79 esperantistoj: 44 infanoj kaj 35 plenkreskuloj.

Pri la organizado respondecis la senlacaro Christina Brücker kaj Lars Sözüer kun sia tuta familio (inkluzive de la avino, tio estas, la patri-

no de Christina), kaj ĉiuj partoprenantaj familioj helpis kaj kontribuis en unu aŭ alia maniero al la programo. En la surlokaj praktikajoj grava helpanto estis la pola esperantistino Danuta (Danka) Leyk.

La programo estis tre multflanka, kun ludoj, manlaboroj, kantado kaj alia muzikado, ekskursoj kaj kompreneble multa naĝado en la lago. Se iu kredis, ke esperantistoj komprenas nur pri Esperanto, ĉiu familio malpravus tion – troviĝis tiom da homoj kun arta, muzika, sporta kaj aliaj kapabloj kaj pretaj instrui la aliajn.

Nia familio (la gepatroj kaj la gefiloj 10-, 8- kaj 5-jaraj) partoprenis nian unuan REF-on, kaj niaj impresoj estis tre pozitivaj. La renkontiĝo estis vere paroliga por la infanoj – krokodilado malmultis – kaj ĝi certe firmigis nian identecon kiel Esperanta familio.

La infanoj povis renkonti siajn korespondantojn kaj trovi novajn geamikojn, kaj kompreneble ankaŭ ni gepatroj formis novajn amikecojn, firmigis malnovajn, kaj multe lernis pri la ĉiutaga vivo de familioj en aliaj landoj.

La historio de la REF-oj estas seninterrompa ekde la unua, organizita de la familio Csizsár en Hungario en la 1979-a jaro. Tio estas des pli grava atingajo, ke pri la renkontiĝoj neniam respondecis ia asocio aŭ alia organizaĵo, nur individuaj familioj. La sekva REF okazos fine de julio 2006 en sudokcidenta Ĉeĥio. Por ricevi informojn pri ĝi, aliĝu al la listo DEN-ASK-L, kiu ekzistas jam de dek jaro!

Jouko Lindstedt  
[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

### LIBROJ

## Afrika membiografio

**Adebayo Ola Afolaranmi: La instruisto. Prozo originala, rakontoj. Fondaĵo Afriko de UEA. Lome 2003. 53 paĝoj. Prezo: 4.80 eŭroj.**

Leginte La Instruisto-n mi sentas ke la verkinto verkis tute honestan priskribon pri sia vivo, pri sia longa malfacila vojo al diplomiĝo kaj laborposteno kiel instruisto, kaj pri siaj revoj iam fariĝi profesoro pri la joruba lingvo. La celo de la verko ankaŭ estas priskribi instruistajn travivaĵojn kaj zorgojn kaj tiel sciigi la mondon pri la malfacilaj laborkondiĉoj de instruistoj en Niĝerio. Tiun ĉi celon Adebayo Ola Afolaranmi realigas per priskribo de siaj memoroj.

Aparte memorinda epizodo estas pri la samklasano Gbenga, kiu en la komenco de la libro ridis pri la heroo, ĉar tiu volas fariĝi fama verkisto. En la fino de la libro montriĝos ke Gbenga ne estis nur malsukcesonta bubo, sed ke ankaŭ Gbenga havis planojn. Mem legu por ekscii kiajn planojn. Plaĉas al mi legi pri kiel homoj en Niĝerio vere devas peni por edukiĝi, situacio ne simila al tiu en nia lando.

La verkinto povus pli bone prilabori la tekston. Iam ŝajnas al mi ke estas multe da superfluaĵoj. Oni povus priskribi la diversajn epizodojn pli mallonge, kaj enmeti iom pli da epizo-

doj. Do, ŝajnas al mi ke la libro estas iom maldensa. Mi opinias ke estas iom tro multe da longaj frazoj en la libro. La stilo tial fariĝas iom oficiala.

Koncize. Interesa enhavo, sed iom seka stilo. Mi gratulas al la verkinto, kaj tute certe opinias ke li povos verki pliajn interesajn librojn.

Leif Nordenstorm

## Romano de Spomenka Ŝtimec aperis japane

Ĝus aperis japana traduko de la biografia romano "Tilla". La esperantlingva originalo de la romano aperis en 2002.



La japana eldonejo Sinpuu-sya

(Nova Vento) eldonis en oktobro 2005 la romanon de Spomenka Ŝtimec "Tilla" en la japana traduko de Mori Singo.

Tilla estis la nomo de la aŭstra-germana aktorino Tilla Durieux, kiu dum la epoko de Hitler fuĝis el Berlino. Preskaŭ du jardekojn ŝi pasigis en Kroatio. Revene al Berlino ŝi daŭrigas rican karieron de aktorino.

En la Muzeo de la urbo Zagrebo en Kroatio troviĝas ĉambro de Tilla Durieux kun pluraj artaĵoj el la kelkaj artkolektoj de Tilla. La verko de Ŝtimec estas inspirita de la vivo de la aktorino. La japana eldono estas ornamita per pluraj fotoj el la Muzeo de la urbo Zagrebo.

La Esperanta eldono de la verko aperis ĉe Edistudio en Italio en 2002. En recenzo pri la esperanta eldono, Sten Johansson skribas interalie: "Spomenka Ŝtimec evidente plenumis admirindan laboron serĉante biografiajn faktojn pri la vivo de Tilla kaj aliaj, kaj ŝi havas talenton jam de longe dokumentitan eniĝi en la menson de de persono mortinta aŭ vivanta por imagi, kio pelis ŝin, kion ŝi aspiris, pri kio ŝi revis."

Tamen laŭ la recenzanto la romano ne atingas la artan nivelon de pli fruaj verkoj de la aŭtoro, kvankam ĝi ja estas parte interesa kaj sukcesa. La recenzo legeblas en la retejo Originala Literaturo Esperanta.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)